# O. WILDE

# HOMA ANIMO
## SUB
# SOCIALISMO

(Esperantigo : Kris Long)

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
121B * 1978 * 1,5FF

## ANTAŬPAROLO

***********

Oscar Wilde (oskar ŭajld) estas konata nun ĉefe pro spritaj teatraĵoj, el kiuj la plej fama estas "The Importance of Being Earnest" (ne-esperantigebla vortludo!).

Li verkis ankaŭ poemojn, romanon, rakontojn por infanoj, kaj kelkajn eseojn, plejparte pri arto, inter kiuj troviĝas "La Homa Animo sub Socialismo", trafa eldiro de anarkista sinteno, kaj "De Profundis", longa letero verkita dum lia malliberigo * (pro samseksemo), kiu kelkloke retuŝas la samajn temojn.

Wilde iam komencis recenzon jene : "Malliberigo mirinde efikis sur S-ron... kiel poeton", do estas interese kontroli, ĉu tia sperto ŝanĝis ankaŭ lian sintenon. Pro tio mi serĉis la malsimilajn pecojn de "De Profundis", kies tradukojn mi aldonas. Laŭ ilia atesto, ĉia sperto povus esti fruktodona al Wilde; kaj eble, ĝuste pro tio, nenio povus vere ŝanĝi lin - ĉar efektive ŝajnas, ke li ne "renaskiĝis", reliberigite.

Tion oni povas rilatigi al ŝanĝiĝo (falo?!) de kritikaj sintenoj dum la 19a jarcento, de "la celo de kritiko estas vidi la aferon tia, kia ĝi vere estas" (Matthew Arnold) al "rigardi la spektaklon kun konvenaj emocioj - jen la celo de ĉia kulturo" (Walter Pater). Sed la unuan vidpunkton oni ja trovas kelkloke ĉe Wilde, ekz. en dialogo "La Kritikisto kiel Artisto" : tie "kritiko mondcivitanigas", forigante antaŭjuĝojn - nek komercaj interesoj nek emociaj simpatioj (sen potenco) certigos pacon, sed nur la sinteno de Goethe, kiu diris dum la napoleona invado "Kiel verki malam-kantojn sen malami? Kaj kial mi, al kiu gravas nur kulturo kaj barbareco, malamu unu el la plej kulturaj nacioj sur la tero, de kiu devenas tiel granda parto de mia kulturo?" - nur tio donos "la pacon, kiu fontas el kompreno".

Aludo en la sama dialogo eble helpos klarigi la optimismon de Wilde : "Ĉie en Anglio renaskiĝas la dekoraciaj artoj. Malbelo estas for. Eĉ en la domoj de riĉuloj regas bongusto, kaj la domojn de tiuj, kiuj ne estas riĉaj, oni faris graciaj kaj plaĉaj kaj dolĉaj por enloĝi." Ni memoru, ke la zorgoj de William Morris ampleksis kaj socialismon kaj la dekoraciajn artojn.

Tio sufiĉu por instigi al legado; mi mallongigis "La Homan Animon..." kaj ne ĉiujn "frazojn kaj filozofiojn" tradukis, sed esperebIe mi ne tordis la argumentojn.

Kris Long (tradukinto)
Bracknell, majon 1976.

* Lia "Balado pri l'prizono Reading" estas jam legebla en Esperanto (vidu "Nordan Prismon", 1967, p.114).

## LA HOMA ANIMO SUB SOCIALISMO

***************************

La starigo de Socialismo valorus ĉefe pro tio, ke ne plu necesus vivi por aliaj...

Plejparte la homoj fuŝas siajn vivojn per malsana kaj troa altruismo. Ĉirkaŭas ilin malriĉo, malbelo, malsato... kaj neeviteble ĉio ĉi forte tuŝas ilin... La emocioj pli facile tuŝiĝas ol la intelekto... do estas pli facile simpatii suferon ol simpatii penson. ...Iliaj kuraciloj ne sanigas, sed daŭrigas la malsanon; la kuraciloj ja estas parto de la malsano. Ili penas solvi la problemon de malriĉo, pluvivigante la malriĉulojn...

Sed la vera celo estas rekonstrui la socion tiel, ke malriĉo ne eblas. Kaj la altruistaj virtoj fakte malhelpis tion. Kiel la plej malbonaj sklavposedantoj estis tiuj, kiuj ĝentile traktis la sklavojn, kaj tiel malebligis komprenon de la terura sistemo far tiuj, kiujn ĝi suferigis; tiel en Anglio nuntempe plej malhelpas tiuj, kiuj penas bonfari.

Plue, estas malmorale uzi proprietaĵojn por mildigi la malbonojn, kiujn kaŭzas la proprieto.

Sub Socialismo ĉio ĉi ŝanĝiĝos. Oni ne plu edukos malsanajn, malsatajn infanojn en tute malloga ĉirkaŭaĵo. Socia sekuro ne plu dependos de la vetero. Ni ne plu vidos cent mil senlaborulojn nur ĉar frostas...

Aliflanke, Socialismo valoros nur ĉar ĝi kondukos al Individuismo.

Proprieto ofte senmoraligas... ĝi iĝas teda kaj neeltenebla pro troaj postuloj. Por helpi la riĉulojn ni devas forigi ĝin. Oni diras, ke la malriĉuloj neniam dankas. Ili estas nedankemaj, malkontentaj, mal-

obeemaj kaj ribelemaj. Ili tute pravas... Kial danki pro la paneroj, kiuj falas de sur la tablo de la riĉulo?... Per malobeemo fariĝis progreso... Kelkfoje oni laŭdas la malriĉulojn pro ŝparemo, sed rekomendi ŝparemon al malriĉuloj estas kaj groteske kaj insulte, kvazaŭ oni konsilus al iu, kiu mortas pro malsato, ke li malpli manĝu... Se temas pri almozpetado, estas pli sekure peti ol preni, sed pli bele preni ol peti. N e : malriĉulo nedankema, malŝparema, malkontenta kaj ribelema verŝajne estas vera personeco... La virtulojn malriĉajn oni povas ja kompati sed tute ne laŭdi. Mi preskaŭ ne povas kompreni, kiel homo, kies vivon fuŝas kaj malbeligas tiaj leĝoj, povas konsenti, ke ili daŭru.

Sed la klarigo ne estas malfacile trovebla : mizero kaj malriĉo tiel premas la homojn, ke neniu klaso vere konscias pri sia suferado. Ili devas ekkoni ĝin pere de aliaj, kiujn ili ofte tute ne kredas. La grandaj dungantoj sendube pravas kontraŭante agitantojn : agitantoj enmiksiĝas kaj entrudiĝas en tute kontentan soci-klason kaj tie semas malkontenton. Tial nepre necesas agitantoj. Sen ili ne antaŭenirus ni al civilizo. Sklaveco estis forigita en Ameriko ne pro ia agado de la sklavoj aŭ ĉar ili konscie deziris liberiĝi, sed tute per la kontraŭleĝa konduto de iuj agitantoj en Boston aŭ aliloke, kiuj estis nek sklavoj nek sklav-posedantoj, kaj fakte neniel rilatis al la afero. Estas strange rimarki, ke ili ricevis de la sklavoj ne nur malmultan helpon sed eĉ preskaŭ nenian simpation; kaj kiam, fine de la milito, la sklavoj troviĝis liberaj, eĉ tiel liberaj ke ili rajtis malsati, multaj el ili treege bedaŭris la novan staton.

Estas do klare, ke nenia aŭtoritata Socialismo taŭgos. Ĉar sub la nuntempa sistemo, multaj homoj povas vivi iom libere kaj esprim-kapable kaj feliĉe; sed sub industri-kazerna sistemo aŭ ekonomia tiranismo, neniu povus ĝui tian liberon. Estas bedaŭrinde, ke parto de nia komunumo estas preskaŭ sklava; sed estus malsaĝe solvi la problemon per sklavigo de la tuta komunumo. Ĉiu devas resti libera elekti sian laboron... Se ne, lia laboro estos malbona por li, en si mem kaj por la aliaj.

Mi konfesas, ke multajn el la socialistaj vidpunktoj, kiujn mi renkontis, infektas ideoj pri aŭtoritato aŭ eĉ devigo... Ĉia asocio devas esti tute memvola, ĉar nur en memvolaj asocioj la homoj estas belaj.

Sed oni rajtas demandi, kiel Individuismo, kiu nun plejparte dependas de la ekzisto de proprieto por disvolviĝi, gajnos per la forigo de proprieto.

Ĝi gajnos jene... La rekono de proprieto difektis Individuismon kaj kaŝis ĝin, konfuzante la homon kaj ties havaĵojn,... celante ne kreskon sed gajnon. Do la homoj pensis, ke gravas havi, ne sciante, ke gravas esti. Vere la posedaĵoj de la homoj tiel sorbis la personecon, ke la angla leĝaro ĉiam traktis atencojn kontraŭ proprietaĵoj pli severe ol atencojn kontraŭ la homoj mem... Kaj ankaŭ la laboro, kiu necesas por gajni monon, treege senmoraligas... Homoj mortigas sin per tro-laborado por havigi proprietaĵojn; sed tio ne mirindas, ĉar oni tiom profitas per proprieto. Mi bedaŭras, ke la socio estas tiel konstruita, ke la homoj estas ensulkigitaj kaj ne povas libere disvolvi tion mirindan, allogan kaj ĝuindan en ili. En nunaj kondiĉoj ili estas ankaŭ tre malsekuraj. Riĉan komerciston ĉiumomente minacas aferoj, kiujn li ne regas. Se la vento iomete plifortiĝos aŭ la vetero subite ŝanĝiĝos, eble lia ŝipo rompiĝos kaj li estos malriĉulo tute sen la antaŭa socia loko. Nenio krom li mem devas povi difekti homon. Tute nenio devas povi priŝteli lin. Kion li vere havas, tio estas en li. Ĉio ekster li devus tute ne gravi.

Mi dubas, ĉu ni iam vidis plenan esprimon de personeco, se ne per imago, en arto... Plejparte la personecoj devis esti ribeluloj. Frotado duonforuzis la forton. La personeco de Bajron, ekzemple, terure konsumiĝis batalante kontraŭ la stulteco, hipokriteco kaj filistreco de la angloj. Tiaj bataloj ne ĉiam plifortigas. Ŝeli estis pli feliĉa. Same kiel Bajron, li forkuris de Anglujo kiel eble plej baldaŭ. Sed li estis malpli konata. Tamen, eĉ ĉe Ŝeli, oni foje rimarkas tro fortan ribelemon. Ne ribelemo, sed paco, distingas la perfektan personecon.

La vera homa personeco...ne disputos... ne pruvos... ĉion scios, sed ne klopodos scii...havos saĝon...havos nenion, sed tamen havos ĉion, eĉ ankoraŭ havos ĉion for-

prenitan, tiel riĉa ĝi estos...nek praviĝos ĉiam la aliajn nek postulos, ke ili similu ĝin...sed amos ilin, ĉar ili malsamas... Sed ne praviganre la aliajn, ĝi tamen helpos al ĉiuj, same kiel belaĵo helpas, simple estante si mem.

"Konu vin" estis skribite super la pordego de la antikva mondo. Super la pordego de la nova mondo estas skribite "Estu vi". Kaj Kristo diras al la homoj simple "estu vi" - jen la sekreto de Kristo.

Kiam Jesuo parolas pri malriĉuloj, li parolas pri personecoj, same kiel parolante pri riĉuloj li simple parolis pri tiuj, kiuj ne disvolvis la personecon. Sed rimarku, ke Jesuo neniam diras, ke malriĉigitaj homoj nepre estas bonaj kaj riĉaj homoj nepre malbonaj. Tio ne estus vera. La riĉuloj kiel klaso estas pli bonaj ol la malriĉuloj, pli moralaj, pli inteligentaj, pli ĝentilaj. Nur unu klaso en la komunumo pensas pri mono pli ofte ol la riĉuloj : la malriĉuloj. Ili povas pensi pri nenio alia - jen la mizero de malriĉo. Sed Jesuo ja diras, ke la homoj perfektiĝas nek havante nek farante, sed estante.

Estis virino kaptita en adulto. Oni ne rakontas la historion de ŝia amo, sed sendube tiu amo estis grandega; ĉar Jesuo diris, ke ŝiaj pekoj estas pardonitaj, ne ĉar ŝi pentis, sed ĉar ŝi tiel forte kaj mirinde amis. Poste, nelonge antaŭ lia morto, kiam li sidis dum bankedo, la virino eniris kaj verŝis multekostajn parfumojn sur liajn harojn. La amikoj intervenis, dirante ke estas tro, ke oni devus elspezi la monon por doni almozojn al bezonantoj aŭ io simila. Jesuo kontraŭstaris tion, rimarkigante, ke la materiaj bezonoj de la homoj estas grandaj kaj tre daŭraj, sed la spiritaj bezonoj eĉ pli grandaj; kaj dum unu dia momento, elektante propran esprim-manieron, personeco povas perfektiĝi. La mondo eĉ nun adoras tiun virinon kiel sanktulon.

Jes, Individuismo instigas. Ekzemple, Socialismo neniigos la familian vivon. Kune kun proprieto la nuna formo de edzeco devos malaperi. Individuismo bonvenigos kaj bonigos tion, transformante la forigon de leĝaj baroj en liberecon, kiu helpos plene disvolvi personecon.

Do kiu deziras vivi laŭ Kristo, estas perfekte kaj tute si mem. Li povas esti granda poeto aŭ granda sci-

encisto; studi ĉe universitato aŭ prizorgi ŝafojn sur erikejo; fari dramojn kiel Ŝekspiro aŭ pensi pri Dio kiel Spinoza; esti infano ludanta en ĝardeno aŭ fiŝkaptisto ĵetanta retojn en la maron. Ne gravas, kio li estas, se li perfektigas la animon en si. Ĉia imitado en moralo kaj vivo malpravas. Kiom da neperfektaj homoj, tiom da perfektecoj. Dum eblas cedi al am-postuloj kaj tamen resti libera, neniu povas cedi al konform-postuloj kaj resti libera.

Individuismo estas do tio, kion ni atingos pere de Socialismo. Nepre sekvas, ke la Ŝtato eĉ ne pripensu regadon. Ĉiuj specoj de ŝtatregado malsukcesas. Tiranismo estas maljusta al ĉiuj, eĉ al la tirano... Oni iam esperis pri demokratio; sed demokratio signifas nur batadon de la popolo far la popolo por la popolo. Ĝi estas jam senmaskigita, pro kio mi ĝojas, ĉar ĉiu aŭtoritato malplibonigas kaj la regantojn kaj la regatojn. Uzate perforte kaj kruele, ĝi bone efikas, kreante, aŭ almenaŭ elmontrante, la spiriton de ribelemo kaj individuismo, kiu mortigos ĝin. Uzate iom ĝentile, kun premioj kaj rekompencoj, ĝi terure senmoraligas. Tiuokaze la homoj malpli konscias pri la terura premo sur ili kaj travivas la vivojn en ia kruda komforto, kvazaŭ dom-bestoj, neniam eksciante ke ili verŝajne pensas la pensojn de aliaj, vivas laŭ la normoj de aliaj, eĉ kvazaŭ portas la forĵetitajn vestaĵojn de aliaj, neniam eĉ dum unu momento estante si mem. "Kiu volas liberiĝi", diras bona pensulo, "ne konformiĝu".

Kune kun aŭtoritato forvelkos punado. Dum la legado de historio, naŭzas ne la krimoj de la malbonuloj, sed la punoj truditaj far la bonuloj. La kutima uzado de puno senfine pli brutigas komunumon ol la kelkfoja okazado de krimo. Ju pli da puno, des pli da krimo.

Se la Ŝtato ne regos, oni rajtas demandi, kion ĝi faros. La Ŝtato estu memvola asocio por organizi laboron kaj por produkti kaj disdoni necesaĵojn. La Ŝtato faru utilaĵojn, la individuo belaĵojn. Ĉar mi parolis pri laboro, mi ne povas ne diri, ke nuntempe oni diras multajn stultaĵojn pri la digno de manlaboro... Balai neĝkovritan voj-kruciĝon dum ok horoj en okcidenta vento estas naŭza laboro. Laŭ mi, ne eblas balai ĝin

kun mensa, morala aŭ fizika digno. Ĉoje balai ŝin estus terure... Tian laboron devus fari maŝino.

Maŝinoj devos labori por ni en karb-minejoj, fari ĉiaspecan purigadon, hejti vaporŝipojn, enpoŝtigi leteron dum pluvo... Nuntempe maŝinoj konkuras kun homoj. En justaj kondiĉoj maŝinoj servos homojn... Kiel arboj kreskas dum la mastro dormas, tiel dum la Homaro amuzas sin... aŭ faras belaĵojn... aŭ simple miras pri la mondo, maŝinoj faros la necesan kaj malagrablan laboron. Civilizo ja bezonas sklavojn - pri tio la Grekoj pravis. Sen sklavoj por fari la malbelan kaj neinteresan laboron, kulturo kaj meditado preskaŭ ne eblas. Homa sklaveco estas maljusta, malsekura kaj malmorala. De maŝinsklaveco dependas la estonteco de la mondo... Ĉu Utopie? Mapo de la mondo, kiu ne ampleksas Utopion, estas ne-rigardinda, ĉar mankas la ununura lando, kien la homaro ĉiam albordiĝas... Progreso signifas realigi Utopiojn.

/Sekvas pluraj paĝoj pri arto; mi citos nur la substrekitajn tezojn : /

Artaĵo estas unika sekvo de unika sinteno. Ĝi estas bela ĉar la aŭtoro estas tio, kio li estas. Ĝi neniel rilatas al tio, ke aliaj deziras tion, kion ili deziras.

Arto estas la plej efika formo de Individuismo, kiun la mondo iam konis.

Arto neniam penu plaĉi. La publiko penu esti arte.

En Anglujo plej bone fartis la artoj, pri kiuj la publiko ne interesiĝas. Fakte la publiko uzas la klasikojn de iu lando por kontroli la progreson de arto.

Ĉiujn verajn poetojn kaj prozistojn de ĉi tiu jarcento la brita publiko solene proklamis senmoralaj.

La artisto neniam malsanas. Li eldiras ĉion.

Fakte la ŝatataj romanoj, kiujn la publiko opinias sanaj, ĉiam estas tre malsanaj produktoj; kaj tio, kion la publiko opinias malsana romano, ĉiam estas bela kaj sana artaĵo.

Fakte la publiko nesatigeble scivolemas pri tio, kio ne sciindas.

Ĉi tie ni permesas tutan liberon al ĵurnalistoj kaj tute limigas la artiston.

La artaĵo regu la rigardanton; la rigardanto ne

regu la artaĵon.

Vera artisto ne rimarkas la publikon. Por li la publiko ne ekzistas.

La formo de regado, kiu plej taŭgas por artistoj, estas nenia regado.

Oni diros, ke tia plano estas tute ne realigebla kaj kontraŭa al la homa naturo. Tute vere... Pro tio ĝi estas realiginda; pro tio ĝi estas proponita. Ĉar kio estas realigebla plano ? - aŭ jam ekzistanta plano aŭ plano realigebla en ekzistantaj kondiĉoj. Sed ĝuste pri la ekzistantaj kondiĉoj oni plendas; kaj ĉiu plano, kiu povas akcepti tiujn kondiĉojn, estas maljusta kaj stulta. Oni forigos la kondiĉojn kaj la homa naturo ŝanĝiĝos. Pri la homa naturo ni vere scias nur tion : ke ĝi ŝanĝiĝas. La sistemoj, kiuj malsukcesas, sin apogas sur la sameco de la homa naturo, ne sur ties kresko kaj disvolviĝo.

Individuismo estos ankaŭ sen egoismo kaj sen afektemo. Oni rimarkas, ke la tiraneco de aŭtoritato tordas la ĝustajn kaj simplajn signifojn de la vortoj kaj uzas ilin por esprimi kontraŭajn signifojn. Oni diras, ke iu estas egoisto, se li vivas laŭ la maniero plej taŭga por realigi sian personecon; sed ĉiuj devus tiel vivi. Egoismo ne signifas vivi laŭ mia plaĉo, sed postuli, ke aliaj vivu laŭ mia plaĉo... Egoismo kreas unuformecon ĉirkaŭ si; malegoismo rekonas senfinan plurformecon kiel ion ĝuindan.

Individuistoj...ankaŭ praktikos simpation... Ĉia simpatio estas bona, sed malplej bone estas simpatii suferon...ĉar ĉeestas ia timo pri la propra sekuro. Ni timas, ke ni mem blindiĝos kaj neniu prizorgos nin. Kaj tia simpatio strange limigas : necesas simpatii la tutan vivon, ne nur la vundojn kaj malsanojn, sed ankaŭ la ĝojon kaj belon kaj energion kaj sanon. Tiu pli larĝa simpatio estas, kompreneble, malfacila. Ĝi bezonas pli da malegoismo. Ĉiu povas simpatii la suferojn de amiko, sed necesas tre bela naturo - tiu de vera individuisto - por simpatii la sukceson de amiko. ... Simpatio kun ĝojo pligrandigas la sumon de ĝojo, dum simpatio kun doloro ne vere malpligrandigas la sumon de doloro.

Ĉar la estonta Individuismo disvolviĝos per ĝojo. Kristo ne klopodis rekonstrui la socion, do la individuismo, kiun li predikis al la homoj, povas realiĝi nur per doloro aŭ en soleco. Sed la homoj estas laŭ naturo socianoj, kvankam la terura vero, ke oni povas realigi sin per doloro, mirinde allogis la mondon. Malprofundaj predikantoj...diras, ke la mondo adoras plezuron, kaj ploraĉas kontraŭ ĝi; sed ĝojo kaj belo estis idealoj nur tre malofte en la historio. Multe pli ofte la mondo adoris doloron. Mezepokeco - la sanktuloj kaj martiroj, la amo al sinturmento, la sovaĝe pasia sinvundemo... - estas la vera kristanismo, kaj la mezepoka Kristo estas la vera Kristo. Kiam la Renesanco tagiĝis, kun novaj idealoj - la belo de la vivo kaj la ĝojo de vivado - la homoj ne komprenis Kriston. Eĉ desegnante lin krucumita, ili desegnis belan Dion, kiun malbonaj homoj suferigis. Por trovi bildon de la vera Kristo ni rigardu la mezepokan arton. Tie li estas difektita kaj malbeligita; ne plaĉas rigardi lin, ĉar belo estas ĝojo;... li bezonas nek proprieton nek sanon; li estas dio perfektigante sin per doloro.

Sed tamen necesis proponi doloron kiel vojon de mem-realiĝo. Iu, kiu loĝas en nuntempa Rusio, povas perfektigi sin nur per doloro. Kelkaj rusaj artistoj realigis sin en arto,. en romanoj, kiuj estas mezepokecaj, ĉar regas la realiĝo de homoj per suferado... Neniisto, kiu neas aŭtoritaton, ĉar li scias, ke ĝi estas malbona, kaj bonvenigas doloron, ĉar per ĝi li realigos ŝian personecon, estas vera kristano.

Sed tamen Kristo ne ribelis kontraŭ aŭtoritato. Li havis neniun planon por rekonstrui la socion. Sed la nuntempa mondo ja havas planojn. Ĝi celas forigi malriĉon kaj la tialan suferadon. Ĝi fidas Socialismon kaj Sciencon kiel metodojn, celante tian Individuismon, kia eldiros sin per ĝojo. Doloro ne estas la ĉefa vojo de perfektiĝo. Ĝi estas nur provizora kaj kontraŭa, rilatante al maljusta kaj malsana ĉirkaŭaĵo. Kiam la malbono, la malsano kaj la maljusto estos forigitaj, ĝi ne plu havos lokon. Ĝia laboro estos farita. Estis granda laboro, sed nun preskaŭ finita. Ĝi malpli ampleksas ĉiun tagon.

Neniu sopiros al ĝi. Ĉar tio, kion ĉiam serĉis la homoj, vere estas nek doloro nek ĝuo, sed simple vivo. La nova Individuismo, kiun vole nevole servas Socialismo, estos perfekta harmonio; tio, kion la grekoj serĉis, sed nur pensante tute realigis, ĉar ili havis sklavojn kaj manĝigis ilin; tio, kion la Renesanco serĉis, sed nur en arto tute realigis, ĉar oni havis sklavojn kaj malsatigis ilin.

(1891)

## FRAZOJ KAJ FILOZOFIOJ POR UZADO FAR JUNULOJ

*********************

La unua devo en la vivo : esti kiel eble plej arte-farita.

La duan devon ĝis nun neniu eltrovis.

Malico estas mito elpensita de bonuloj por klarigi la strangan allogon de aliaj.

Tiuj, laŭ kiuj animo kaj korpo malsamas, havas nek unu nek la alian.

Montrite veraj, religioj mortas. Scienco estas la registro de mortintaj religioj.

Bone edukitaj homoj kontraŭdiras aliulojn. Saĝuloj kontraŭdiras sin mem.

Nenio, kio fakte okazas, eĉ iomete gravas.

Tedeco estas plenkreska seriozeco.

En ĉiuj malgrandaj aferoj ne sincero, sed stilo plej gravas. En ĉiuj grandaj aferoj ne sincero, sed stilo plej gravas.

Nur malprofundaj homoj konas sin.

Ĉiam estu iomete neverŝajna.

Vero ne plu estas vera, se pli ol unu homo kredas ĝin.

Aŭ estu artaĵo, aŭ portu artaĵon.

Maljunuloj kredas ĉion; mezaĝuloj supozas ĉion; junuloj scias ĉion.

Nur la grandaj stil-majstroj sukcesas esti malklaraj.

Sinamo komencas tutvivan am-aferon.

(1894)

# el "DE PROFUNDIS"

La 13an de novembro 1895 oni alportis min de Londono. De la dua ĝis la dua kaj duono mi devis stari sur la centra kajo de Clapham Junction stacidomo en la vestoj de punlaborulo, mankatenite, por ke la mondo rigardu. Oni prenis min el la malsanul-ĉambro sen ia averto. El ĉiaj eblaj aferoj mi estis la plej aĉa. Vidante min, la homoj ridis. Ĉiu alvenanta vagonaro ŝveligis la rigardantaron. Nenio povis plie amuzi ilin. Tiam, kompreneble, ili ne sciis, kiu mi estas. Informite, ili tuj ridis eĉ pli. Dum duonhoro mi staris en griza novembra pluvo, ĉirkaŭite de mokanta homamaso...

Kiam mi estis ekmalliberigita, iuj konsilis, ke mi forgesu, kiu mi estas. Jen ruiniga konsilo. Nur komprenante, kiu mi estas, mi trovis ian komforton. Nun aliaj konsilas ke, kiam mi estos liberigita, mi forgesu, ke mi iam estis en malliberejo. Estus same mortige fari tion. Pro tio ĉiam hantus min netolerebla honto, kaj ĉio farita por mi kaj por ĉiuj - la belo de suno kaj luno, pluvo falanta tra folioj, roso ŝtelpaŝante tra la herbo arĝentigante ĝin - estus makulita por mi kaj ne plu povus sanigi aŭ komuniki ĝojon. Bedaŭrante la proprajn spertojn, oni ne plu disvolviĝas...

Racio ne helpis min. Laŭ ĝi, mi estas kondamnita pro maljustaj leĝoj kaj suferis sub maljusta sistemo. Sed iel mi devas fari el tiuj aferoj ion justan kaj bonan por mi... La traba lito, la mallogaj manĝaĵoj, la malmolaj ŝnuroj por disŝiri ĝis la fingropintoj sensensiĝis pro doloro... ĉiun kaj ĉiujn mi devis transformi en spiritan sperton.

Antaŭ ses semajnoj la doktoro permesis min ricevi blankan panon anstataŭ la kruda nigra aŭ bruna pano kutime manĝata en la malliberejo... Por mi ĝi estas tia frandaĵo, ke fine de ĉiu manĝo mi zorge manĝas ĉiujn panerojn, kiuj restas sur la lada telero aŭ estas falintaj

sur la mantukon uzatan por ne malpurigi la tablon; tion mi faras ne pro malsato - la manĝoj nun tute sufiĉas - sed nur por malŝpari nenion donitan al mi...

Mi klare memoras, ke mi diris al ŝi, ke en unu londona strateto estas sufiĉe da doloro por montri, ke Dio ne amas la homojn; kaj ke ĉie, kie ĉeestas doloro, eĉ nur tiu de infano ploranta en ĝardeneto pro peko farita aŭ ne farita, la aspekto de la kreita mondo estas tute makulita. Mi tute malpravis. Ŝi diris tion, sed mi ne povis kredi ŝin... Nun ŝajnas al mi, ke nur ia speco de amo povas klarigi tiom da doloro en la mondo... Mi estas certa, ke alia klarigo ne eblas; ke se la mondo vere estas farita el doloro, faris ĝin la manoj de amo, ĉar alie la homa animo, por kiu la mondo estas farita, neniel plene perfektiĝus. Ĝuo por bela korpo, sed doloro por bela animo.

Du el la plej perfektaj vivoj, laŭ mia sperto, estas tiuj de Verleno kaj de Princo Kropotkin : ambaŭ pasigis jarojn en malliberejo... Dum la pasintaj 7-8 monatoj, kvankam sinsekvo de grandaj zorgoj atingas min preskaŭ senĉese de la ekstera mondo, mi rekte kontaktiĝis kun nova spirito, laboranta en ĉi malliberejo per homoj kaj aferoj, kiu helpas min pli ol direblas per vortoj: tial ke, farinte dum la unua jaro de mallibero nenion krom tordi la manojn pro malespero kaj diri "Kia fino, kia terura fino", nun mi provas diri al mi - kaj foje, kiam mi ne torturas min, diras vere kaj sincere - "Kia komenco, kia mirinda komenco!"... Se mi estus liberigita la pasintan majon... mi forirus malamante la ejon kaj la oficistojn tiel amare ke la vivo estus venenita. Mi spertis pluan jaron en malliberejo, sed homeco ĉeestis kune kun ni ĉiuj kaj nun, forirante, mi ĉiam memoros favoregojn far preskaŭ ĉiuj...

Mi tremas pro ĝojo, pensante ke la tagon, kiam mi forlasos la malliberejon, la laburno kaj siringo floros en la ĝardeno... Lineo genuiĝis kaj ekploris pro ĝojo, unuafoje vidante la longan erikejon de iu angla altejo flavigita de aromaj uleks-floroj... Same kiel Gautier /gotje/ mi ĉiam estis unu el tiuj, "por kiuj la videbla mondo ekzistas"... Ŝajnas al mi, ke ni ĉiuj tro rigardas naturon, ne sufiĉe vivante kun ĝi. Laŭ mi la greka sinteno estas tre sana. Ili neniam babilis pri sunsubiroj,

ne scivolis, ĉu la ombroj sur la herbo vere estas violaj. Sed ili vidis, ke la maro estas por naĝantoj kaj la sablo por la piedoj de kurantoj... Ni nomas nian epokon utileca, sed ne scias, kiel io ajn utilas. Ni forgesas, ke akvo kaj fajro purigas, ke la tero estas ĉies patrino. Pro tio nia arto estas luna kaj ludas kun ombroj; dum greka arto estas suno kaj ĉion traktas rekte. Mi estas certa, ke elementaj fortoj purigas, kaj mi volas revivi en ties ĉeesto. Ĉiuj procesoj minacas la vivon, samkiel ĉiuj juĝoj kondamnas al morto; trifoje mi estis juĝata... En socio tia, kian ni faris, mankos loko por mi; sed naturo, kies dolĉa pluvo falas same sur maljustulojn kaj justulojn, havos fendojn en la rokoj, kie mi povos kaŝi min... La maro, laŭ Eŭripido en unu el la dramoj pri Ifigenia, forlavas la vundojn kaj makulojn de la mondo.

---

Gérant & imprimeur : Baudé 47340 Laroque Timbaut
Commission paritaire de presse 39 863.